# Sekso kaj Egaleco

Sendependa novajletero

Numero 8

Oktobro 1981


Brasília - la 66a UK
1981 07 25 - 08 01

## VIRINA AGADO DUM LA KONGRESO

Multaj virinoj estas limigitaj en sia agado pro manko de kutimo kaj memfido paroli publike. Tial ili ne povas partopreni en publikaj diskutoj kaj prezenti siajn opiniojn al aliaj. Tiun konkludon oni atingis en pluraj kunsidoj pri virina agado dum la lastaj jaroj. Plurfoje oni proponis, ke devus okazi kurso pri publika parolado por helpi tiujn virinojn.

Kelkaj brazilaj kunlaborantinoj organizis kurson por la Universala Kongreso. Post prelego pri la arto de publika parolado, la aŭskultintoj povis renkontiĝi en malgrandaj grupoj kun gvidanto por mem debati pri difinita temo. En la dua parto de la aranĝo, tamen, estis sufiĉe granda miskompreno. Laŭ pli frua decido, la diskut-grupoj estis planitaj specife por virinoj, por helpi tiujn kiuj sentas embarason pri publika elpaŝado. Kiam tio estis anoncita, iuj ĉeestantoj protestis, ke oni planas la agadon nur por unu sekso. Multaj eĉ lasis la salonon ĝenate. La diskut-grupoj tamen renkontiĝis, kaj Maria Almada priskribas la sian en la sekvonta artikolo. Sed ŝi ne estis tute kontenta pri la disvolviĝo de la debato, kaj en aparta letero ŝi skribas:

> "Tiuj grupoj al mi ne plaĉis multe. Jen la inoj nur susuris kaj ne parolis publike, kiel ni tion volis. Se

# Sekso kaj Egaleco

Sendependa novaĵletero

**Jarabono** (4 numeroj):
12,00 gld. aŭ 15 irk.

Internaciajn respondkuponojn sendu rekte al Anna Brennan, aŭ pagu al ŝia nederlanda poŝtĉekkonto 4412211.

Limdato por la venonta numero: 15a de decembro.


**Redaktoro**

Anna Brennan
p/a Nieuwe Binnenweg 197B
3021 GA Rotterdam
Nederlando


**Kunlaborantoj en ĉi tiu numero:**

Audrey C.E. Childs-Mee
Loes Demmendaal
Judith Junger
Lembe Laanest
Charles Power
Dermod Quirke
Lu Wunsch-Rolshoven


Presis Strangled Vole Press en London, Britio.


**Perantoj**

**Internacia** (prezo: 14,50 ned. guldenoj): Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉekkonto 378964 (UEA). Banko: Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 EA Rotterdam (konto 25.52.89.804).

**Argentina**: Hugo A.Lingua, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario.

**Brita** (prezo: 3,00 britaj pundoj): Dermod Quirke, 18 Trouville Road, London SW4 8QL. Poŝtĉekkonto 12 463 0006.

**Franca**: Anne Elise Amblès, 51 rue Blanche, 75009 Paris.

**Germana** (prezo: 12,00 germanaj markoj): Lu Wunsch-Rolshoven, Gerichtstr. 43, 2000 Hamburg 50. Poŝtĉekkonto Hmb.4168 27-201.

**Itala** (prezo: 5600 liroj): Alessandro Panerai, Via Pistoiese N457, 50010 Campi-Bisenzio.

**Japana** (prezo: 1500 enoj): Hukunaga Makiko, Midori-so 2-1, Kamisyakuzii 1-739, Nerima-ku, Tôkyô, 177. Ĝirokonto 0-99911, Tôkyô.

**Norvega** (prezo: 30,00 norvegaj kronoj): Margrete Landmark, Torødveien 109, 3135 Torød. Poŝtĉekkonto 5 73 61 29.

**Novzelanda**: J. T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington 3.

**Sveda** (prezo: 25,00 svedaj kronoj): Märtha Andréasson, 2265 Tolsered, 425 90 Hisingskärra. Poŝtĉekkonto 27 01 05-4880.

**Usona** (prezo: 6,50 usonaj dolaroj): Charles Power, Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando. (Oni pagu per ordinara usona enlanda ĉeko al la nomo Charles Power).

ĉiuj esprimiĝas susure, ili neniam lernos paroli klare kaj laŭte.

"Mi sugestas, ke ni virinoj estu pli unuiĝintaj kaj ke ne okazu kiel en Luzern, Stockholm kaj eĉ en Brasília, ke ni post la kunveno ne konas plu unu la alian. Mi volonte amikiĝus kun aliaj virinoj kaj eble korespondadus, sed kiel? Neniu konas min, nek mi iun.

"Mia komento estas, ke ni virinoj estu pli toleremaj. Kiam la grupoj formiĝis, la eŭropaninoj grupiĝis kaj en mia grupo restis virinoj el Aŭstralio, Usono, Urugvajo kaj Brazilo. Ĉu diskriminacio? Kial?"

## Kunvenoj dum la kongreso

Maria Almada ♀, Brazilo

En lundo okazis la unua nepublika kunveno de la virinoj. Ĉeestis ĝin 18 personoj el: Brazilo, Britujo, Bulgarujo, Japanujo, Kolombio, Hungarujo, Nederlando, Svislando, Svedujo, Usono kaj Urugvajo.

Estis pritraktita la prezentota temo. La jenaj temoj estis sugestitaj: "La sperto de eksterhejme laboranta virino en la socio"; "Kiamaniere la virinoj povas helpi la mondan kaoson"; "Pozicio de la virino en diversaj kulturoj"; "Pozicio de la virino en moderna familio". Tiu lasta temo estis aprobita, kiel taŭga por la diskutgrupoj.

Estis decidite formi grupojn en kiuj ĉiuj povos esprimiĝi libere. Pro la lastmomenta manko de la antaŭvidita prelegonto pri la temo "La arto paroli publike", estis petite al William Auld fari ĝin.

En mardo okazis la unua publika kunsido, kiun ĉeestis 69 personoj, inter ili kelkaj viroj. La aranĝon malfermis kaj direktis Loes Demmendaal, el Nederlando, kaj Maria Almada, el Brazilo. Sekvis la interesa prelego de William Auld, el Britujo, pri "La arto paroli publike". Li donis diversajn ekzemplojn el sia longjara sperto.

Post la anonco kaj klarigo de la elektita temo, la ĉeestantaro dividiĝis en tri grupojn, por debati la temon kaj doni

## KUNVENO EN HAMBURGO

1982 03 06-07

Dum la kunveno en Rotterdam, ni decidis renkontiĝi denove venontjare en Hamburg, FR Germanujo. Elsbeth Bormann faras la aranĝojn. Membroj de la reto de kunlaborantoj kaj partoprenintoj en la lasta renkontiĝo aŭtomate ricevos inviton kun plenaj detaloj. Aliaj interesatoj bonvolu skribi al: Komisiono pri Virina Agado, p/a Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

## KONVENCIO

KVA nun havas korektitan tradukon de la Konvencio pri la Forigo de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj. Kopio estas havebla de KVA kontraŭ 3 irk. por kovri la kostojn de fotokopiado kaj afranko.

opiniojn pri ŝi. La grupojn gvidis Elsbeth Bormann, Loes Demmendaal kaj Maria Almada.

La opinio de mia grupo estis, ke estas interese ke la virinoj laboru ekster la hejmo, ĉar tiel ŝi sekvas la vivevoluon; havu samajn rajtojn, kiel la viroj; por la sama laboro en samaj kondiĉoj pergajnu salajron egalan al tiu de viro; havu voĉdonrajton; la edziniĝintaj virinoj ne flanken-ŝovu la needziniĝintajn; la virino organizu sian vivon, tiel ke ŝi kapablu bone vivi en moderna familio. (Neniu klarigis, kio okazu kun nekapablaj virinoj aŭ nekleraj.)

Omaĝe al niaj gastinoj, junulino gitarludis kanzonon el Brazilo.

En vendredo la kunvenon prezidis Eliza Kehlet, estraranino pri virina agado ĉe UEA, kune kun Loes Demmendaal kaj Maria Almada. S-ino Kehlet klarigis la signifon kaj laboron de la virina komisiono.

S-ino Demmendaal parolis pri la renkontiĝoj ekster la UKoj de la virinoj kaj pri la celo eduki la esperantistinojn superi la malfacilaĵojn, plilarĝigi la virinan agadon kaj altigi la nombron de ĝiaj membroj. Ŝi proponis, ke virinoj sendu al enlandaj esperantistaj gazetoj artikolojn pri la virina agado kaj ke la virinoj protestu ĉe la gazetoj, kiuj negative skribas pri la virinoj aŭ iliaj problemoj.

Yukiko Isobe disdonis demandilojn pri la virinaj problemoj. Tiu enketo estis eldonita de la plej malnova japana ĵurnalo

Mainiti, kiu havas legantaron de 4,5 milionoj. Ĝi celas elmontri en Japanujo la opinion de la mondvirinaro.

S-ino Petrova el Bulgarujo laŭtlegis la mesaĝon de la komisiono pri virina agado el la sama lando, kiu sciigis, ke en tiu lando la virina agado estas libera. La instruistinoj ricevis de la registaro 20-tagan ferion por lerni Esperanton. Du horojn semajne oni instruas Esperanton en mezgradaj lernejoj.

## SALUTO DE BULGARAJ VIRINOJ

Dum la publika kunsido pri virina agado en Brazilo, Vasilka Petrova laŭtlegis saluton de la Komisiono pri Virina Agado ĉe Bulgara Esperantista Asocio. Post bondeziroj por sukcesa laboro dum la kongreso, ŝi donis kelkajn informojn pri la laboro de la komisiono en Bulgarujo.

Dum la parolo ŝi aludis al la pozicio de la bulgara virino: "civitanino libera, kun politikaj, profesiaj, kulturaj rajtoj kaj absoluta egalrajteco kun la viro. Ekzistas, kompreneble, diversaj problemoj - pri pli granda kvanto de infanĝardenoj, pri ilia plibonigo; plifacilìgo de la dommastraj kondiĉoj por la laboristino k.a."

Ŝi ankaŭ menciis du problemojn specifajn por esperantistoj. Unu estas, ke esperantistinoj ne aparte atentas la neceson ellerni Esperanton. La alia estas, ke post geedziĝo multaj virinoj lasas la movadon.

Tiam s-ino Petrova anoncis du novaĵojn. Profesiaj instruistinoj en bulgaraj lernejoj nun povas ricevi du dek pagitajn labortagojn jare por studi Esperanton, por ke ili fariĝu instruistoj de la lingvo. En la nova lernojaro, oni rajtas doni fakultativan kurson de Esperanto po du horoj semajne en mez-gradaj kaj teknikaj lernejoj.

Fine, ŝi memorigis, ke ĉi-jare oni festas la 1300an jubileon de la bulgara ŝtato. La sekvonta numero de la revuo Bulgarino estos dediĉita al la rolo de la bulgara virino en la historio de la lando.

S-ino Almada en sia finparolado klarigis la neintereson de la brazilaj virinoj pri la virina agado. Por la plimulto de brazilaninoj la 66a UK estis la unua kongreso. Ili malofte havas okazon partopreni iun UKon, sekve ne konas ĝian valoron. Post la 66a UK eble la intereso kreskos kaj eblos multnombre aliĝi al KVA. S-ino *Demmendaal sugestis, ke la virinoj* respondu la japanan enketilon. Tiel la japana nacia gazeto havos eblecon vidi la laboron de la esperantistinoj.

Por fini la kunvenon, brazilano deklamis "La vojo" de L.L. Zamenhof, omaĝe al la virinoj.

# Konklude...

Ni certe ne povas pretendi, ke nia agado dum la kongreso estis tute sukcesa. La celo de la kunveno estis helpi al la virinoj superi embarason pri publika elparolo de siaj opinioj, sed Maria Almada ankoraŭ konstatis, ke ili nur "susuris". Evidente, ni tro optimisme supozis, ke eblas atingi rezultojn en nur unu sesio, kiam la virinoj eĉ ne havis tempon konatiĝi unu kun la alia. Aliflanke, la situacio ne permesas, ke ili plurfoje renkontiĝu dum periodo de kelkaj monatoj, kiel fakte necesas. Do ni devas pripensi tiun problemon, precipe ĉar ni intencas aranĝi similan programon por la kongreso en Antverpeno venontjare.

La miskompreno pri tio, ĉu la aranĝo estu nur por virinoj, indikas al pli profunda problemo. De lando al lando - kaj eĉ interne de unu lando - la situacio de virinoj varias. Do ne estas surprize, ke varias ankaŭ ilia interpreto de la situacio kaj la proponitaj solvoj. Simple ne ekzistas unu "ĝusta" linio, kiu taŭgas por ĉiuj virinoj tra la tuta mondo. Sed tio kondukas al malfacilaĵo, kiam oni provas organizi virinan agadon je internacia nivelo. Kiel ni povas kombini la tre diversajn spertojn kaj opiniojn de virinoj el pluraj landoj en unu agadplano? Tion ni neniam diskutis, verŝajne ĉar ni ne klare konstatis pri la problemo. Por solvi ĝin ni devos esti pretaj aŭskulti, kompreni kaj akcepti niajn malsamajn vidpunktojn, ne trudante unu opinion al ĉiuj. Sed ĉu ni povas fari tion sen perdi ŝian forton kaj direkton?

ab

# PLIE PRI LA KOMUNA PRONOMO

(El artikolo kiu unue aperis en la kanada revuo Lumo, aŭtuno 1980)

Por komunaj personnomoj, kiuj ne indikas sekson (homo, persono, infano), ni bezonas pronomon por la singularo de la tria persono, kiu ankaŭ ne indikas sekson. Oni proponis tiucele uzi "ĝi". Sed tio estus malbona solvo, ĉar ĝi povus kaŭzi konfuzon inter persono kaj afero, kiel s-ro T. Nakamura montras en Oomoto (jan-jun. 79, p. 58): "La prezidanto de la klubo plenumas taskojn, difinitajn al ĝi en la statuto." Ĉu "ĝi" reprezentas ĉi tie la prezidanton aŭ la klubon?

Ankaŭ Zamenhof malrekomendis en Lingvaj Respondoj n-ro 91 la uzon de "ĝi" por tiu nocio: "... ĉar la vorto 'ĝi' (uzata speciale por 'bestoj' aŭ 'senvivaĵoj') enhavas en si ion malaltigan (kaj ankaŭ kontraŭkutiman) kaj por la ideo de 'homo' ĝi estus iom malagrabla, tial mi konsilus al vi fari tiel, kiel oni faras en la aliaj lingvoj, kaj uzi por 'homo' la pronomon 'li'."

Ĉar oni hodiaŭ ne plu ŝatas tiun evidente seksisman rekomendon, oni proponis novan pronomon "ri". Ankaŭ tiu solvo ŝajnas al mi ne rekomendinda, ĉar oni prave plendis, ke niaj pronomoj "mi, vi, ni, li" havas tro similajn sonojn, kaj ke pro tio miskomprenoj okazis+. Tial mi proponas la pli distingan formon "ŝili", el kiu oni sen klarigo komprenas, ke ĝi signifas "ŝi aŭ li". Ŝajnas al mi tute juste unue mencii la vorton "ŝi", por tiel iomete kontraŭpezigi la troan virecon de niaj bazaj konceptoj.

Ĉar pronomo kun tiu signifo laŭ mia scio ne ekzistas en etnaj lingvoj, iuj el vi eble opinias, ke ĝi estas superflua. Sed ankaŭ ne-Esperantistoj sentas la bezonon de tiu pronomo, kion pruvas artikolo de N.J. Spencer en American Psychologist de aŭg. 1978, p. 782/83. La artikolo klarigas, kial sili proponis por la angla novan pronomon "co" kiel neŭtran pronomon por la singularo de la tria persono.

Vilma Eichholz ♀ (ajĥholc), Kanado

---

+Esperantologia Konferenco 1978, Varna

# KVA

## Reto de virinoj

En la aprila numero de SkE, ni raportis pri la kunveno de virinoj en Rotterdam. Unu el la decidoj de tiu kunveno estis starigi reton de virinoj tra la mondo, kiuj povus kunlabori kun KVA. La kontaktado de virinoj progresis iom malrapide (interalie pro redaktado de SkE kaj simile!), sed finfine ni ja skribis al 58 virinoj en 28 landoj. 23 el la virinoj estis delegitoj de UEA pri virinaj aferoj, 4 estis aktivuloj en fakaj asocioj, kaj la aliaj estis konataj pro sia intereso pri virina agado.

Al ĉiu virino ni sendis kvazaŭ-personan leteron kaj liston de sugestoj pri manieroj kunlabori kun KVA. Ekzemple, ni sugestis, ke ili povus formi grupon kun aliaj virinoj en la sama lando, ke ili povus verki aŭ prelegi pri la situacio de virinoj, ke ili povus protesti kiam aperas diskriminacia artikolo en Esperanto-revuo, ke ili povus kunlabori kun nacia virina asocio en sia lando.



Ĝis septembro ni ricevis plurajn respondojn - kaj pozitivajn kaj negativajn - al la letero. 11 virinoj en naŭ landoj promesis kunlabori diversmaniere, per esplorado, verkado, prelegado, grafika laboro, kontakto kun naciaj asocioj ktp. Aliaj respondis, ke ili pretas fari tradukojn por KVA, kiam ni bezonos tion. Temas pri jenaj lingvoj: angla, estona, flandra (nederlanda), franca, hebrea, latva, pola, rusa.

## Agado kaj agantoj

Pluraj virinoj skribis al ni pri siaj ideoj kaj agadoj. Eble la plej aktivaj en la nuna momento estas la bulgaraj virinoj. Belka Beleva, membro de la Virina Komisiono de Bulgara Esperantista Asocio, skribis al ni: "La roterdama dialogo reeĥis en la virina renkontiĝo (Virina Komisiono ĉe BEA kun kunlaborantinoj el la distriktaj societoj) dum majo - bonege. Bulgara esperantisto sciiĝis pri du virinaj aranĝoj. Jen nia foto - sufiĉe tradicia sed vere historia. En la mezo la maljuna damo estas T. Petkova, merita membro de la Virina Komisiono, longjara prezidantino. La nura viro estas P. Todorov, respondeculo pri nia agado ĉe oficiala instanco. Li ĉeestis la renkontiĝon." (Petâr Todorov, cetere, estas ankaŭ estrarano de UEA pri faka agado.) Tuj dekstre de s-ino Petkova staras Belka Beleva, kun iom klinita kapo.

Alia tre aktiva aganto, jam antaŭ la stariĝo de la reto, estas Leonor Calvo y Feijóo el Kolombio. Ŝi estas sekretario de Internacia Ligo de Virinoj por la Paco kaj Libereco, kaj pasintjare ŝi ĉeestis la UN-Konferencon de la Jardeko por Virinoj en Kopenhago. Ŝi produktas amason da informiloj en diversaj lingvoj pri Esperanto kaj pri virinoj.

## Helpilo pri verkado

Unu el la sugestoj al la kunlaborantoj en la reto temis pri verkado de artikoloj. Multaj homoj bezonas helpon pri verkado, do dum la kunveno en Rotterdam Judith Junger proponis verki konsilaron por ili. Montriĝis, ke ankaŭ Stefan Maul ♂ (ŝtefn maŭl), la redaktoro de la revuo Monato, bezonas tian konsilaron por siaj kontribuantoj. Do li proponis eldoni ĝin. Judith ĵus finverkis la malneton.

---

# Forugh-Farohzad

Irana poetino (1934–1966)



Parivash Farzandshad ♀

Forugh-Farohzad dum sia mallonga vivo luktis nelacigeble por virina egaleco kaj emancipado de la irana virino. Ŝi ribelis kontraŭ malnovaj tradicioj kaj rompis tiujn valorojn kaj kredojn, eĉ ne timis kalumniojn kaj priklaĉojn.

Ŝi estis eksplodo el la dolora komplekso kaj longa silento de la irana virino. Ŝi tutanime batalis kontraŭ baroj kaj obstakloj. Ŝi estas konata ne nur en Irano sed en aliaj najbaraj landoj. Bedaŭrinde ŝi en junaĝo forpasis pro aŭto-akcidento.

Krom pri poezio ŝi aktivis pri teatro kaj kinematografio. La filmo La domo estas nigra, pri la vivo de la lepruloj, estis elstara dokumenta filmo, kiu gajnis la premion ĉe la festivalo Oberhausen. Unesko preparis duonhoran filmon pri ŝia vivo. Poste Svedujo invitis ŝin, sed bedaŭrinde la morto ne donis tempon kaj ŝi forpasis.

Eldoniĝis traduko de ŝia poemaro en kelkaj lingvoj, la germana kaj angla...

En ŝiaj unuaj verkoj, Kaptito, Muro, ŝia ribelo estis individua kaj ekster la socio en la kadro de seksaj problemoj. Ŝi diras:

Mi pekis per plezurplena peko,
En varma, arda brako.

Sed iompostiom ŝi konsciis, ke la problemo de la vivo ne estas solvebla nur en la seksaj rilatoj, do amo en la sublima formo, t.e. homamo, aperas en ŝiaj poemoj:

Falinta popolamaso,
Konsternita, koraflikt ita,
Sub la minacaj kadavroj
Jam migris de fremdeco al fremdeco.

Ŝia lasta verko, Alia naskiĝo, estas simbolo de ŝia humana penso kaj afableco de sincera homo, kiu sentas nun la pezecon de realaĵo tutanime. Ŝi ne sentas konsolan koncepton de ĉiutaga vivo, imagas sin planto kiu kreskas en arida tero, dum ŝia pulso estas ŝveligita de sanga batado. Tamen ŝi ne plonĝas en pesimismon, sed serĉas amon, vivon, lumon, kaj dislumigas, dirante:

Denove, mi salutas sunon,
Rivereton kiu fluas en mia korpo.

Restos kara la memoro de ŝi, kiu restos eterne inter ni.

Ŝi diras:

Mi plantas miajn manojn en ĝardeneto;
Mi estas certa, ke ili elkreskos.

Kaj fine alia parto de bela poemo:

Voko, voko, nur voko restas,
Neniu prezentos min al suno,
Memoru flugon, la birdo estas mortema.

---



DONU AL NI VIAN SUBTENON!

SE VIA ABONO FINIĜAS KUN ĈI TIU NUMERO, REABONU!

---

# Antaŭen kaj...

MONDA Kongreso de Virinoj

La Monda Kongreso de Virinoj ĵus okazis en la ĉeĥoslovaka ĉefurbo, Prago, de la 8a ĝis la 13a de oktobro, kun partopreno de 1200 delegitinoj el la tuta mondo.
La temo de la Monda Kongreso estis: "Egaleco, nacia sendependeco kaj paco".
Post la kongreso okazas la 8a Kongreso de Internacia Federacio de la Virinoj (14a-15a oktobro). La du forumoj notas la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de Eŭĵeni Koton (1881 10 13), kunfondinto kaj unua prezidantino de Internacia Demokratia Federacio de la Virinoj. Esperanta delegacio planis partopreni unu aŭ ambaŭ kongresojn.

MITO

Laŭ Antonietta Corti, sendependa fakulino pri komunikado:
"Estas mito, ke viroj fariĝas pli bonaj laborgvidantoj ol virinoj pro tio ke ili estas pli raciaj kaj malpli emociaj. Estus interese studi ĉiujn neraciajn decidojn faritajn de la ĉefaj viraj gvidantoj dum la lastaj jaroj.
Virinaj gvidantoj havas la samajn problemojn kiel anoj de ĉiu minoritata grupo por trarompi strukturon starigitan de la plimulto. Praktike ĉiuj grandaj kompanioj estas starigitaj de viroj. Tiel ili havas virajn valorojn. Estas tre malfacile por virinoj fariĝi integra parto de tiuj organizaĵoj, ne kompromitante la proprajn valorojn. Estas necese por kompanioj konscii pri tiuj malsamaj valoroj kaj integrigi ilin anstataŭ asimili la virinajn gvidantojn."

TEO-preparantoj

Virinaj membroj de la aŭstralia laborista partio firme intencas preni normalan rolon en la partio, laŭ la unua virina ŝtata prezidanto de la laborista partio, Barbara Wiese.
Ŝi opinias, ke la malsufiĉa reprezentado de virinoj en gvidaj pozicioj en la partio ŝuldiĝas al antaŭjuĝoj kaj diskriminacio. Tial la laborista partio starigas programon de diskutado por ŝanĝi la pozicion de virinoj en la partio.
Per tiu programo oni esperas ŝanĝi la pensmanieron de tiuj funkciuloj, kiuj rigardas virinojn pli kiel problemon ol kiel rimedon, kiel teofarantojn pli ol politikofarantojn.


MORTIS Joke Smit

Joke Smit estis unu el la ĉefaj gvidantoj de la dua granda feminista ondo en Nederlando. Antaŭ pli ol dek jaroj ŝi starigis kune kun kelkaj aliaj la organizaĵon "Viro, virino, socio". Tiam ŝi opiniis, ke la

mondo estas ŝanĝebla per eksterpolitikaj premgrupoj. Sed per analizado kaj diskutado ŝi venis al la konkludo, ke oni pli sukcesus ŝanĝi la socion per virina politika partio de feministoj. Sed ne eblis al ŝi vidi tiun revon realiĝi.

NEREGEBLAJ virinoj

Kiam la hinda registaro preparis la edukajn gvidliniojn por la sendependa Hinda Unio, ĝi decidis, ke la lernejaj studlibroj aktive stimulu seksan egalecon. Sed post pli ol dudek jaroj da registara direktado de la produktado de studlibroj, hindaj edukistoj ŝajne ankoraŭ ne provas certigi, ke la libroj taksu virojn kaj virinojn kiel same intelegentajn kaj kapablajn homojn.



Tio estas la konkludo de artikolo en "The Illustrated Weekly of India" (La ilustrita semajna revuo de Hinda Unio), bazita sur studo de 41 lernolibroj aktuale uzataj de pli ol unu miliono da gimnaziaj studentoj.
Ne nur la lernolibra prezento de virinoj malhelpas hindajn virinojn. La ideo de edukita virino, kiu legas anglalingvajn gazetojn kaj diskutas politikon, tre timigas gepatrojn; ili opinias, ke tiaj virinoj estus neregeblaj.

FEMINISTO arestita

La egipta feministino, Nawal el Saadawi, kiu verkis libron pri rajtoj de la virino laŭ Islamo, estas unu el la 1500 homoj arestitaj antaŭ unu monato en Egiptujo. Post la morto de Sadat sekvas nova ondo de arestoj.

AMIKAJ direktoroj

Ne malofte okazas, ke virino havas problemojn pro tro "amika" labor-direktoro. Kiam la nederlanda semajna revuo "Viva" aperigis personajn raportojn pri tiu temo, alvenis multaj leteroj. Kelkaj el la legantinoj de la revuo rakontis, ke ili estis maldungitaj pro iu preteksto, post kiam ili malakceptis la provon de la direktoro intimiĝi kun ili. Stariĝis laborgrupo por helpi virinojn, kiuj estas ĝenataj pro la nedezirata atento de superulo aŭ kolegoj.

Redaktis la rubrikon ♀ Loes Demmendaal (lus demendaal), Ned. Bonvolu sendi kontribuaĵojn kun mallonga resumo en Esperanto.

Informojn provizis: ♀ Maria Taŝeva, Bulg.; ♂ Renato Corsetti (korseti), Ital.; ♀ Winsome Greenhalgh (ŭinsm grinhalŝ), Aŭstral.; ♂ Probal Daŝgupto, Hind.; ♀ Judith Junger, Ned.

**...malantaŭen**

# Malegaleco malutilas al ĉiu

W. Krikke ♂, Nederlando

Ĉu eblas diri ion saĝan pri la pozicio de virinoj en la socio en pure racia maniero, sen emocioj? Mi kredas ke jes, kaj ekprovas.

Mi ŝatus turni vian atenton al la malprofito por la tuta socio, do ankaŭ por la viroj, de la diskriminacio kontraŭ virinoj.

Estas fakto, ke la nombroj de viroj kaj virinoj preskaŭ egalas. Alia fakto estas, ke ankaŭ la kvalitoj kaj kapabloj de ambaŭ seksoj ne multe diferencas. Se la virinoj havus precize la samajn eblecojn je bona edukado kaj instruado kiel la viroj, la samajn rajtojn al ĉiuj pozicioj en la socio, oni vidus baldaŭ multe pli da virinoj ol nun en la plimulto de profesioj, ankaŭ en la pli altaj rangoj kaj pozicioj.

Ĉu tiu idealo estas dezirinda? Tutcerte kaj tion mi klopodos pruvi. La bonfarto de ĉiu ajn nacio dependas de multaj faktoroj, sed unualoke de la kvalitoj de la membroj de tiu nacio. Ju pli da kapablaj personoj sur ĉiuj terenoj apartenas al tiu nacio, des pli bone la tuta popolo povos plenumi milojn da taskoj en terkulturado, komerco, industrio, trafiko, instruado, sciencoj, artoj, socia prizorgado de aliaj homoj ktp. Ĉiu bone edukita kaj instruita homo estas valora kapitalo por la tuta socio en kiu tiu laboras. Tial ekzemple la landoj de la tria mondo malprofitas, se iliaj studentoj, en la universitatoj kaj altlernejoj de Usono kaj Eŭropo, ne revenas al la patrio, kio ofte okazas.

Sed kiel katastrofe malutila estas la neuzado de la ekzistantaj spiritaj kapabloj de milionoj da inteligentaj virinoj,

kiuj nuntempe pro multaj tradiciaj malhelpoj faras nur simplan rutinan laboron! Eĉ en la plej modernaj industrilandoj oni nuntempe uzas nur malgrandan parton de la kvalitoj de la virinoj. Pruvo: tre malmultaj virinoj en pli altaj pozicioj en la tuta socio. En la "postrestintaj" landoj, la virinoj ĝenerale rajtas labori nur kiel sklavinoj kaj naski multajn infanojn. Jen la ĉefa kaŭzo pro kiu la plimulto el tiuj landoj ne sukcesas progresi. Ĉe tio ni ne forgesu, ke la intelekta nivelo de la virino estas pli grava ol tiu de la patro por la edukado de la infanoj (kompreneble ĉie estas esceptoj).

Multaj viroj timas la konkuradon de virinoj; jen malagrabla negativa faktoro. Sed tiaj viroj absolute malpravas. La nombro da kapablaj laboristoj neniam povas esti tro granda. Ĝuste la kapabluloj elpensas novajn iniciatojn, novajn aranĝojn, pli bonan organizadon. Rigardu en via propra ĉirkaŭaĵo. Kiel ofte okazas malsukcesoj, eĉ fiaskoj, pro nesufiĉaj kvalitoj de gvidantaj personoj, kiuj preskaŭ ĉiam estas viroj? Nekvalifikitaj homoj abundas en ĉiuj landoj dum altkvalitaj mankas kaj certe ankoraŭ mankos en la venontaj jardekoj.

Estas do klare ke multaj leĝoj kaj reguloj devas esti ŝanĝitaj favore al la virinoj. Ĉu post tiu ŝanĝo ĉio estos en bona ordo? Tute ne. Forigado de kontraŭvirina diskriminacio komenciĝu en la familioj! Se tie, en la hejmoj, la viroj regas, kiel hodiaŭ tre ofte okazas en ĉiuj landoj, tiam ankaŭ ekster la hejmo la viro volas regi, ne ĉiam konscie; sed certe subkonscie li diskriminacios kontraŭ la virinoj. Tradicioj estas daŭremaj, ĝuste la malbonaj plej multe. Senlaca longa batalado estos necesa, por ke ne sole la virinoj faru la hejmlaboron, prizorgu la infanojn, faru aĉetojn kaj staru en vicoj por tio. Nuntempe multaj virinoj havas duoblan taskon: dumtage en la laborejo kaj vespere en la hejmo. Ne mirige ke tiaj virinoj maljuniĝas antaŭtempe. Ili fariĝas apatiaj kaj perdas ĉian ajn intereson. Tio estas malprofito por la socio, sed antaŭ ĉio ĝi estas terura maljustaĵo. Ĉi tie libere parolu la emocioj, ĉar estas grandega honto, ke en la moderna tempo, en niaj progresintaj civilizacioj, kiuj fieras pri sia kulturo, ankoraŭ ekzistas tiaj maljustaĵoj. Ĉiu homo kun la koro en la ĝusta loko devas esti kontraŭ ĉia ajn diskriminacio!

# afrikanoj parolas

[Kvara parto]

Claudia Fonseca

**KAJIRA** kiu aĝas 65, vivas en la domo de sia frato. Dum ŝi babilas kun la malnovaj amikinoj, ŝi kudras sarron (pajltapiŝon) per dika kudrilo kaj ledaj strioj.

## ■ Kiel knabino elektas la edzon?

"Mia patro trovis edzon por mi. La unuan fojon mi edziniĝis al viro, kiu min svatis ĝuste en tiu maniero, kiun knabinoj ŝatas, sed li estis tre malriĉa. Post la naskiĝo de infano, li ne povis pagi al mia patro la edzinprezon, kaj ankaŭ liaj fratoj ne povis helpi al li. Mia patro do reprenis min en la domon. Pli poste, alia edziĝis al mi, sed miaj gepatroj tenis ĉe si mian unuan infanon.
Mia dua edzo estis bona homo, kaj mi estis kun li dum longa tempo. Mi estis lia sola edzino. Nun li maljunas kaj ne plu povas kultivi la teron. Ni ne havas filojn, kiuj helpus al ni. Ni havis plu nenion por manĝi kaj mi revenis ĉi tien por vivi en la gepatra domo."



**■ Kiu decidas kiuj gefiloj, viraj aŭ inaj, vizitu lernejon?**

"La edzo. Estas nature, ke virino sekvas la edzon en ĉio, kaj portas al li la manĝon, kiun li bezonas, prenas por li akvon kaj lin obeas ĉiam.
Pli bone, ke la knabinoj ne vizitu lernejon. Tiel ili restas ĉe la patrino kaj helpas al ŝi. Poste, ili iĝos edzinoj kaj patrinoj. Kaj eĉ ne tiam ili havos la tempon por viziti lernejon, ĉar ili devos resti kun siaj gefiloj. Nur virinoj scias, kiel estas karaj la gefiloj, kiom oni suferas por ilin naski kaj poste por ilin kreskigi kaj flegi, kiam ili malsanas. La viroj neniam ion scios pri tiaj aferoj."

## KONKLUDOJ

Ne estas facile doni koheran portreton de la nuntempa kamparanino surbaze de la kvar intervjuoj kun afrikanoj. Estas ĉiam malkonsilinde ĝeneraligi la spertojn de unuopuloj, kaj oni ne scias, ĝis kiu punkto la respondoj malkaŝas la realan situacion aŭ tradicion, kiu jam estis transpasita sed ankoraŭ kondiĉas la pensmanieron. Ekzemple, kiam edzino diras, ke la edzon elektis por ŝi la patro, tiu moro, kredata la nura valida, verŝajne igas ŝin silenti, pri kiom ŝi influis per siaj preferoj la patran decidon.

Kaj ni devas ne forgesi, ke la kampara afrika mondo daŭre kaj rapide evoluas, tiel ke la hodiaŭa bildo jam morgaŭ ne plu respegulos la realon. Tial, la aĝo de la intervjuitaj virinoj influas iliajn respondojn. Dum Kajira donas preskaŭ senkritike la bildon de la ina situacio de antaŭ kvindek jaroj, kiam la patra volo devigis filinon forlasi viron kaj



la filon, kiun ŝi havis kun li, por edziniĝi al alia viro, Kaŭe (SkE 6) jam montras intiman malaprobon. Avujan (SkE 7) deklaras, ke estas bona afero, ke kaj knaboj kaj knabinoj vizitu la lernejon; kaj Kasaana (SkE 5) rakontas, ke ŝia filino mem elektis la edzon kaj restas kun li malgraŭ la vokoj de la patro.

Aliaj mensaj skemoj, kiel ekzemple "peza laboro estas por viroj", "knabinoj ne vizitu lernejon", "knaboj ne devas helpi al la patrinoj" estas foje konfirmitaj kaj foje rifuzitaj. Ni prefere vidu, ĉu la nuna evoluo vere favoras la inojn. Kiel diris Kasaana, pasintece la inoj faris nur malpezajn laborojn en la grandaj milikampoj kaj zorgis poste pri kampetoj de arakidoj aŭ aromherboj. Nun male - eble puŝataj de la deziro de pli granda ekonomia sendependo - inoj komencas havi propran mili- aŭ koton-kampon. Sed ne ŝajnas, ke kompense inoj malŝarĝiĝas de siaj tradiciaj laboroj, kiel kuirado, portado de ligno kaj akvo, kaj infanvartado. La viro, siaflanke, ŝajne ne plimultigis siajn taskojn.

Artikolo el Unesko-kuriero aŭg-sep. 1975
tradukita de Christina de' Giorgi ♀ (kristina de ĝorĝi)

---

# La mutilado de inaj generiloj en Sudano

de Bernard Golden ♂

## Ĉu SkE traktas tro unuflanke virinan cirkumcidon?

La demando pri virina cirkumcido (pli ĝuste klitorektomio aŭ infibulacio) en Afriko jam estis pritraktita sur la paĝoj de SkE (n-roj 1, 3 kaj 6) ĉefe laŭ la vidpunkto de okcidentanoj aŭ afrikanoj forte influitaj de la eŭropa civilizo. Ĉu ilia kritiko estas prava? Kiel rigardas la demandon la afrikanoj mem? Ĝis nun SkE ne sukcesis ricevi opini-esprimon de homoj vivantaj en kulturo, kie la mutilado de virinaj generiloj estas ĉiutaga praktiko.

Unu tia loko estas **Sudano**, subevoluinta agrikultura lando, situanta en la nordorienta Afriko. Ĝia loĝantaro konsistas

el araboj (39%), nubiaj nigruloj (36%), sudanaj nigruloj (23%) kaj eŭropanoj (2%). La dominanta* religio estas la Islamo. Antaŭ sendependiĝo en 1956, Sudano estis sub brita kolonia regado. Mutilado de virinaj seksaj organoj ekzistas ankaŭ en najbaraj landoj: en partoj de Somalio, Eritreo kaj Egiptio, sed ne en Etiopio. La kutimo persistas en Sudano nuntempe malgraŭ sia kontraŭleĝigo ekde 1945. La leĝaj sankcioj nur malofte estas efektivigataj, ĉar ilin superregas la tradicio. La mahometana religio de Sudano permesas klitorektomion sed ne infibulacion. Tiu ĉi speco de mutilado certe estis pli frua ol la Islamo en la regiono; oni opinias, ke okazis infibulacio de sklavinoj en la antikva Egiptio por malhelpi ilian gravediĝon.

Interne de afrikaj kulturoj, kiel la sudana, oni prezentas kvar ĉefajn kialojn por la ekzisto kaj daŭrigo de la kutima mutilado de virinaj seksorganoj. Tiu motivado estis preteratentita en la artikoloj aperintaj en SkE. Ĝi estas resumebla jene:

1. La infibulacio garantias la ĉastecon de la virino. Oni do faras la operacion antaŭ edziniĝo, post nasko aŭ divorco, kaj en okazoj, kiam la edzo longe forestas de la hejmo. La virgeco do estas la ekvivalento de infibulacio: ambaŭ estas bezonataj por certigi la edziniĝeblon de virino. Temas ne nur pri la reputacio de la virino: la honoro de la tuta familio rolas en situacio, kiu ne estas pure persona, sed havas socian dimension. Cetere, virinoj, kiuj koitis antaŭ edziniĝo, kaj adultulinoj estas punataj per ĝismorta ŝtonumado.

2. La infibulacio okazigas naskolimigon. Oni argumentas, ke koito kun virino havanta infibulacion estas dolora, ĉar enpenetro povas efektiviĝi nur per uzo de forto. Rezulto estas maloftiĝo de koito. Sed familia planado estas nur sekundara kialo de infibulacio, ĉar la islama religio ne malpermesas aliajn formojn de naskolimigo.

3. La infibulacio estas parto de la inicad-ceremonio. Tamen, ĝi estas farata longe antaŭ pubereco kaj en diversaj aĝoj.

---

***Domini** = superregi, esti la plej elstara*

4. La infibulacio minimumigas la seksan ekscitiĝon ĉe la virino. Oni supozas, ke ekscizo de parto de la seksorganoj malpliintensigas la virinan ardon por seksaj rilatoj, kaj sekve malpligrandigas ŝian deziron fariĝi prostituitino aŭ esti malĉaste pariĝema. Pro tio la operacio servas por protekti virinon kontraŭ ŝiaj 'malnoblaj impulsoj'.

## Enketo pri tabua temo

Enketo estis entreprenita de brita psikologo* kiel parto de esplorprojekto organizita por objektive akiri informojn pri la sinteno de viroj kaj virinoj en Sudano rilate al infibulacio. Estas akcentende, ke la temo de generila mutilado ene de la sudana kulturo estas preskaŭ tabua, precipe ĉe virinoj. Eĉ se diskutoj estiĝas, ilin karakterizas forta emocio kaj polemikado. Pro tio sciencaj esploristoj nur malfacile povas akiri informojn. La koncerna enketo estis farita en la formo de demandaro prezentita, ne skribe sed perbuŝe, al grupo de universitataj studentoj, kiuj estis preparitaj por ĝi per antaŭa diskuto, kaj kiuj indikis sian emon partopreni. Ili formis relative homogenan grupon - ĉiuj venis de mezklasa socia ĉirkaŭmedio, ili loĝis en urboj kaj studis ĉe la universitato por fariĝi instruistoj. Ili aĝis inter 19 kaj 25 jarojn; 85% estis islamanoj, 15% kristanoj; inter ili estis 153 viroj kaj 32 virinoj. Ĉiuj viroj estis fraŭloj; kvar el la virinoj estis edziniĝintaj. Tiu relative malgranda sampla populacio de nur 185 individuoj malebligis al la enketinto la aplikon de la kutimaj statistikaj metodoj por analizi la rezultojn de la enketo. Aparta malgranda grupo konsistis el 9 mezaĝaj edziĝintaj viroj. Estas substrekende, ke ĉiuj virinoj jam estis submetitaj al infibulacio, kio havis gravan efikon sur iliajn sintenojn, kiel iliaj respondoj indikas.

## Enketaj demandoj kaj respondoj

La ĉefaj temoj de la enketaj demandoj estis jenaj:


---


*L. F. Lowenstein: 'Attitudes and attitude differences to female genital mutilation in the Sudan: is there any change on the horizon?' [Sintenoj kaj sintenaj diferencoj rilate femalan generilan mutiladon en Sudano: ĉu estas ŝanĝo ĉe la horizonto?], en Acta Ethnographica (Budapeŝto), 1980, vol. 29, n-ro 1-2, paĝoj 216-223.

1. Ĉu vi apogas aŭ malapogas (1) infibulacion, (2) klitor-ektomion, aŭ (3) iun alian formon de generila mutilado?
2. Ĉu vi permesus al via filino submeti sin al iuspeca generila ablacio?
3. Kial vi fundamente apogas tiun ĉi kutimon?
4. Kial vi fundamente malapogas tiun ĉi kutimon?
5. Kiujn klopodojn vi opinias entreprenendaj por limigi aŭ malhelpi tiun ĉi kutimon?

Por demandoj 1 kaj 2, nur jes/ne-respondo estis atendata. Male, por demandoj 3, 4 kaj 5, la enketinto prezentis po sep

*Normala adoleska vulvo (etendita)*



*Infibulaciita vulvo.*

*Cirkumcido* estas tranĉo nur de la prepucio.
*Infibulacio* konsistas el tranĉo de la klitoro, minoraj labioj kaj granda parto de la majoraj labioj. La flankoj de la vulvo estas kunpinglitaj per fadeno aŭ dornoj.

kialojn, kiuj estiĝis okaze de la antaŭaj diskutoj kun la studentoj.

La junaj viroj partoprenintaj en la enketo estis plejparte kontraŭ la infibulacio, klitorektomio aŭ alispeca ekscizo de inaj generiloj, ĉar tiuj operacioj:

1. ne estas necesaj
2. baziĝas sur malnovaj kutimoj kaj moroj
3. malbonigas la seksan plezuron de la virino
4. malbonigas la seksan plezuron de la viro
5. estas kruelaj kaj barbaraj
6. estas danĝeraj
7. estas kontraŭ ilia religio kaj juro.

La plejmulto da virinoj favoris tiujn operaciojn; oni tamen rimarku unue, ke la samplo estis tre malgranda (nur 32 personoj), kaj due, ke ĉiu virino jam spertis la operacion. Ili motivis sian starpunkton jene:

1. temas pri socia kutimo
2. virino sen operacio ne povas akiri edzon
3. la generila mutilado estas parto de ilia religio
4. la operacio estas pli sana por virinoj
5. ĝi certigas ĉastecon
6. ĝi limigas naskojn
7. ĝi estas pli pura.

La malgranda grupo de 9 mezaĝaj edziĝintaj viroj de la meza klaso unuanime opiniis, ke la infibulacio estas necesa kaj dezirinda laŭ ĉies vidpunkto.

## Socia premo por kaj kontraŭ generila mutilado

La daŭrigo de infibulacio kaj klitorektomio ĝenerale baziĝas sur socia premo kaj konformigo al geedziĝa tradicio. Apogas la operaciojn ĉefe la pli aĝaj kaj influhavaj virinoj, kiuj fanatike volas konservi la tradicion. Pro tiu forta premo sur virinojn en la sudana kulturo, estas tre malfacile rompi la malnovan establitan kutimon. Estas multe da propagando favora al la kutimo, dum kontraŭpropagando estas malabunda aŭ tute ne ekzistas. Rezulto estas konformiĝo al la sociaj normoj.

Estas ankaŭ viroj, kiuj aprobas tiun tradician kutimon, sed la kialoj estas malfacile scieblaj. Kvankam mankas esplordonitaĵoj pri la efiko de infibulacio aŭ de malpli severaj formoj de generila ekscizo sur seksajn kaj aliajn sintenojn de virinoj, tiu psikologia kromefiko estis studita rilate la ritan cirkumcidon de viroj. Oni konkludis, ke asociiĝas kun tiu ago du konfliktaj sentoj: (1) kastrad-anksieco, kaj (2) socia travivaĵo alportanta pli altan statuson, prestiĝon, donacojn kaj ankaŭ insistadon pri vireco.

Kontraŭaj sintenoj rilate mutiladon de virinaj seksorganoj venas de pli bone edukitaj junaj sudanaj viroj, sed iliaj kialoj spegulas edukajn kaj personajn travivaĵojn probable ekster ilia propra kultura bazo. La ĉefa kontraŭa kialo de la studentoj partoprenintaj en la enketo estas, ke tiuj operacioj, infibulacio kaj kliterektomio, malhelpas reciproke bonajn seksrilatojn por la geedza paro. Eble tiu pli klerigita vidpunkto transiros al aliaj niveloj de la sudana socio en la estonteco. Ekzemple, pro la pli granda bezono de salajrataj laboristoj, knabinoj komencas laboron en relative juna aĝo kaj akiras ekonomian sendependecon; tio ebligas al ili kontraŭstaron. Rezulte de tio, ili estas pli ofte submetataj al la malpli severa operacio de klitorektomio anstataŭ infibulacio.

La ĉefaj manieroj proponitaj de la junaj viroj por limigi la kutimon de generila mutilado ĉe virinoj estas la sekvaj:

1. la registaro faru ion por efektivigi la leĝojn kontraŭ ĝi
2. oni eduku plenkreskulojn, precipe pli aĝajn personojn
3. oni igu kuracistojn paroli kontraŭ ĝi
4. oni igu religiajn gvidantojn de la Islamo paroli pli ofte kontraŭ ĝi
5. oni verku klerajn artikolojn kaj librojn por kondamni la kutimon
6. junaj knabinoj estu frue admonataj, por ke ili ne permesu la operaciojn
7. edzoj postulu, ke ili preferas edzinojn sen operacio.

## Ĉu estas ŝanĝo ĉe la horizonto?

Ĝis tiu ĉi punkto mi resumis enhavon de la raporto ve-kita de la psikologo, kiu faris la enketon en Sudano. Tiuspeca

studaĵo pri emocie ŝarĝita tabua temo estas valora, ĉar ĝi provas analizi la sintenojn de homoj rekte koncernataj pri la demando de virina generila mutilado. Tamen, miaopinie ne estis tuŝitaj kelkaj gravaj punktoj. Unu rilatas al la disvastiĝo de la prostituado en la sudana socio. Se viroj havas facilan aliron al prostituitino, ne gravas por ili la ofteco aŭ kvalito de seksaj rilatoj kun iliaj edzinoj. Ili do povas apogi la generilan mutiladon, aŭ simple resti indiferentaj kaj ne okupiĝi pri ŝanĝo de la kutimo.

La diversaj operacioj ne estis pritraktitaj laŭ sia funkcio rita kadre de la tutaĵo de la sudana kulturo kaj kun rilato ankaŭ al la vira cirkumcido. Etnografoj nomas tiujn kutimojn ritoj de transiro (rites de passage): ili ligiĝas kun krizoj aŭ ŝanĝoj de statuso en la vivo de individuo (naskiĝo, malsano, puberiĝo, geedziĝo, morto). Post generila aŭ alispeca korpa mutilado, gejunuloj rajtas akiri la statuson de plenkreskulo. Sen submetiĝo al tiuj ritoj, ili restos ekster sia socio, kaj tio havos tragediajn sekvojn. Male, membroj de la socio, kiuj submetis sin, ĝuas prestiĝon kaj socian agnoskon - tio pli gravas, ol momenta doloro aŭ posta malkomforto. La kerna demando en ĉiu tradicia kulturo, kiel tiu de Sudano, estas: ĉu oni estas akceptita kiel plena membro de la socio, aŭ ĉu oni estas rigardata kiel malkonformemulo? La universitatanoj eble akceptus tiajn eksterulojn, sed la pli vasta socio konsistas ĉefe el pli aĝaj kaj tre influhavaj homoj, kiuj apogas la tradician ordon. Koneksa demando estas: ĉu la liberala sinteno de tiuj junaj studentoj daŭros en postaj jaroj, aŭ ĉu ili fariĝos konservativaj, kiam ili komencos ludi aliajn rolojn en la socio?

Rigardo de la demando laŭ alia vidpunkto indikas, ke la nuna tendenco en islamaj landoj estas en la direkto al plifortigo de tradiciaj kulturaj valoroj kaj bremsado de radikalaj modifoj. Pro tio ne estas probable, ke okazos baldaŭa ŝanĝo en la praktiko de virina generila mutilado en Sudano kaj aliaj regionoj de Afriko. Cetere, al kritiko de tiu kutimo fare de fremdaj homoj kaj organizaĵoj, starantaj ekster la kultura ĉirkaŭmedio, povas havi efikon kontraŭan al tiu celata. La rezisto al ŝanĝo eĉ pli fortiĝos, se tiuj elementoj de la tradicio fariĝos identec-simboloj.